

Esperanto 280

aktuell



42. Jahr (2023) №4 (280)

Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



△ Partoprenantoj de la 100-a GEK antaŭ la foirejo de Braunschweig. El bibliotekoj kaj arkivoj. Jarĉefkunveno por la jaro 2022 de la Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg. Limburga Tago unuigas tri landojn. 100 jaroj de Sarlanda Esperanto-Ligo. Renkontiĝo en Vieno. La centa Germana Esperanto-Kongreso. ·kune· Impreso de KEKSO. Lingvaj Perspektivoj – TEJO ĉe la Eŭropa Junulara Okazaĵo. 39-a Printempa Semajno Internacia okazis denove reale.

Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B
www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

Bankkonto (por membrokotozaj kaj donacoj) /

Bankverbindung (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): HELADEF1ERB, Sparkasse Odenwaldkreis, DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

Leitung: **Elke Mondorf**
030 / 5106 2935, 0800 336 3636
Fax: 030 / 4193 5413

gea.oficejo@esperanto.de

Membroprizorgado / Mitgliederbetreuung

DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

Estraro GEA / Vorstand DEB

Netzpost an / retmesaĝo@gea.fe@esperanto.de

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form vorname.name@esperanto.de.

Prezidanto / Vorsitzender

Martin Haase, Durchwahl: -5111

gea.prezidanto@esperanto.de

Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Durchwahl: -5112

Trezoristo / Kassenwart

Reinhard Pflüger, Durchwahl: -5113

Sekretario / Schriftführer

Nils Brinkmann, Durchwahl -5125

Administrado / Verwaltung

Jean-Paul Kuhfahl, Durchwahl -5124

Membroadministrado/Mitgliederverwaltung

Steffen Müller, Durchwahl -5121

Librokatalogo/Bücherkatalog

Barbara Brandenburg, barbara.brandenburg@esperanto.de

Suborganizoj / Unterorganisationen /

Erasmus+ Andreas Diemel, Durchwahl: -5114

Informteknologioj/Informationstechnologie

Franz Kruse, Durchwahl: -5119

Meza generacio / Mittlere Generation

Michaela Stegmaier: Durchwahl: -5126

Jugendvertreter / Junulara reprezentanto

Jonas Schulz, Durchwahl: -5118

Germana Esperanto-Junularo /

Deutsche Esperanto-Jugend

Michael Vrazitulis, Durchwahl: -5211

michael.vrazitulis@esperanto.de

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte

Gazetaraj kaj publikaj aferoj

/Presse und Öffentlichkeitsarbeit

Louis von Wunsch-Rolshoven,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de

Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter

für virtuelle Treffen Heinz-Wilhelm Sprick,

gea.zoom@esperanto.de, tel. Durchwahl -5128

Komisiito por rondvojaĝoj/ Rundreisen,

Durchwahl -5123

Uli Ender, uli.ender@esperanto.de

Informmaterialo/Informationsmaterial

Goar Engeländer, Durchwahl: -5127

goar.engelaender@esperanto.de

Mediinecho

Hermann Kroppenber, Durchwahl: -5121

mediinecho@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanz**,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl:

-5122, buchversand@esperanto.de, www.esperanto.de/buchversand

Komisiito Interreta Redaktado /

Beauftragter Internetredaktion

Thomas Bormann, Durchwahl: -5117

thomas.bormann@esperanto.de

Vertreter des DEB in der EEU-Versammlung/

Reprezentanto de GEA en la asembleo de

EEU: Jean-Paul Kuhfahl

Durchwahl: -5116

jean-paul.kuhfahl@esperanto.de

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)

Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy**

(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj kulturo),

Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die

Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363,

Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Ulrich Brandenburg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), www.esperanto.de/dei

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

bibliothek@esperanto-aalen.de

bibliothek-aalen@esperanto.de

www.esperanto.de/bibliothek

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Andreas Emmerich, estraro@fame-stiftung.de

(nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG,

BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio /

Österreichischer Esperanto-Verband

aef@esperanto.at, www.esperanto.at

Esperantomuzeo Vieno /

Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrngasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische

Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25,

1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes-

beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA

Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanz**, Adressen

siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Poŝtel. +43/66473611289,

aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:

Stano Marček (Martin/Slovakio),

Yashovardhan Singh, Im Johannistal 23,

42119 Wuppertal. Durchwahl: -54

Kunlaborantoj / feste Beiträger:

Aŭstria Esperanto-Federacio

Hermann Kroppenber (Mediinecho),

Utho Maier (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)

Presejo / Druck: Alfaprint, Martin, Slovakio

Esperanto aktuel kun *-kune-* havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 19 €

(de eksterlando: 25 €) jare.

Esperanto aktuel mit *-kune-* erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 19 €

(Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc

a.s.) al ea@esperanto.de, por n-ro 2023/5 ĝis la

15-a de Septembro 2023. Paperaj kontribuoj nur

esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu

supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte

(im Format *.doc o.ä.) an ea@esperanto.de,

für Nr. 2023/4 bis zum 15. Juli 2023.

Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an Yashovardhan Singh (s.o.).



Karaj legantoj,

mi salutas vin de la paĝoj de *Esperanto aktuell* por la unua fojo. Ekde la transpreno de la prezidanteco de Germana Esperanto-Asocio mi jam havis okazon iomete hejmiĝi en mia nova tasko. Feliĉe, min subtenas vigla estraro kaj pli granda aro de engaĝitaj aktivuloj. Mi tre ĝojas, ke GEA disponas pri tiom da vere aktivaj membroj, ĉar asocio kiel la nia estas la bazo por pli vasta komunumo, kiu aktivigas ne nur en la organizita Esperanto-movado, sed ankaŭ per komputilaj retoj kaj personaj kontaktoj. Foje, Esperanto-parolantoj, kiuj apartigas sin de la organiza vivo, asertas, ke la asocioj estas antikvaj kaj ne plu necesaj por prospera Esperanto-movado. Sed estas evidente, ke sen la kadro de la organizita movado, multaj aktivaĵoj ne povus okazi, ĉar la asocioj transprenas la administran kaj finanĉan kadrojn por ebligi kunvenojn kaj kontaktojn.

Kiam vi legas ĉi tiujn liniojn, multaj el la someraj aktivecoj jam okazis. Eblas retrorigardi al multaj aranĝoj: la Germana Esperanto-Kongreso en Brunsvigo, la somera programo de Kastelo Greziljono, la Baltiaj Esperanto-Tagoj, la Universala Kongreso en Torino, la kongresoj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj la Internacia Junulara Kongreso kaj multaj aliaj. GEA povis subteni kelkajn vojaĝantojn pere de subvencioj el la eŭropa programo Erasmus+ kaj ankaŭ povos fari tion en venontaj aranĝoj. Se vi estas

partoprenema kaj volas profiti de tia subvencio, bv. kontakti la koncernan estraron Andreas Diemel. Ni tre ĝojas, ke ni havas tiun eblecon, ĉar ĝi fortikigas nian movadon kaj ebligas al unuopuloj havi klerigajn renkontiĝojn kun aliaj Esperanto-parolantoj. Kio pli taŭgas por konstrui eŭropan identecon kaj ebligi interkulturajn kontaktojn?

Kvankam la somero ankoraŭ ne finiĝis, jam estas tempo antaŭĝoji la aŭtunajn kaj vintrajn aktivecojn jam anoncitajn sur la venontaj paĝoj. Eblas aliĝi interalie al nia aŭtuna migrado kaj festi la 100-jaran jubileon de Sarlanda Esperanto-Ligo, por menciigi nur du aranĝojn en Germanio, sed kompreneble la internacia kalendaro estas tre plena. Kiel kutime, aŭtune kunvenos ankaŭ la landaj ligoj kaj fakaj grupoj de GEA. Tradicie, tio okazos en la Esperanto-urbo Herzberg. Ĉiuj aktivuloj estas invitataj inter la 3-a kaj 5-a de Novembro tie partopreni por kunordigi nian agadon. Post tio, baldaŭ sekvos la kutimaj jarŝanĝaj aranĝoj. Pri la nova jaro vi ankoraŭ en venontaj numeroj havos la okazon informiĝi. Jam nun menciindas la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo de la 8-a ĝis la 12-a de Majo 2024. Tie okazos ankaŭ la jarĉefkunvenoj de pluraj eŭropaj Esperanto-asocioj, inter kiuj GEA. Pli ol en nacia kongreso, ni povos tie montri la valoron de Esperanto kiel ligilo inter la popoloj kaj kulturoj. Koincide, la 9-an de Majo oni festas la Eŭropan Tagon kaj en junio de la venonta jaro okazos la eŭropaj balotoj – bona okazo do, por paroli pri Esperanto je eŭropa nivelo. Krome, Strasburgo estas bela urbo kun speciala eŭropa etoso kaj ĝi estas facile atingebla el Germanio. Mi persone multe antaŭĝojas tiun okazon – ankaŭ ĉar tio ebligas al mi renkontiĝi kaj interparoli kun multaj el vi, karaj legantoj, kaj kun amikoj el najbaraj landoj.

Mi deziras al vi bonan legadon de tiu ĉi numero de *Esperanto aktuell*!

Martin Haase

Enhavtabelo/Inhalt

1: Partoprenantoj de la 100-a GEK antaŭ la foirejo de Braunschweig. Foto: D-ro Matthias Hecking.

2: Adresoj.

3: Germana Esperanto-Asocio: Karaj legantoj. Enhavtabelo.

4: Interkultura Centro Herzberg:

Esperanto-Informationsstand beim Herzberger Zamenhof-Denkmal. Jarĉefkunveno por la jaro 2022 de la Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg.

5-7: 20: El la landaj kaj fakaj ligoj:

Limburga Tago unuigas tri landojn. 100 jaroj de Sarlanda Esperanto-Ligo. BAVELO invitas al sia Aktiva Seminario en Rottweil, 1-a – 3-a de septembro 2023. BAVELO lädt ein zum Aktiva Seminario in Rottweil, 1.-3. September 2023. Afrika agado. Renkontiĝo en Kolonjo. Kalendaro.

8-10: Aŭstria Esperanto-Federacio:

Kunvenoj de CoNGO (Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj). Renkontiĝo en Vieno. Intervjuo kun Amri Wandel.

11-13: Germana Esperanto-Asocio:

D.E.B.-Haushaltsplan 2024. Protokoll der Bundesversammlung am 28.05.2023 in Braunschweig.

14-15: Germana Esperanto-Kongreso: La centa Germana Esperanto-Kongreso.

De Bandung al Braunschweig.

16: Publika agado: Erklärung des Deutschen Esperanto-Bundes: „Mehr als 130 Jahre Esperanto-Sprachgemeinschaft“. Anzeigen zu Esperanto in großen Zeitungen.

17-18: El bibliotekoj kaj arkivoj:

Folge 72 – Urheberrecht: hilfreich oder aus der Zeit gefallen?

19-22: Medienecho.

22-23: Evangelische Kirchentag:

Die „Weltsprache der Herzen“ auf dem Kirchentag.

Libroprezent: Pri la vivo de Esperantista ĉiopovulo.

25-29: kune – revueto de Germana

Esperanto-Junularo: Enkonduke. Mein erstes KEKSO. Impreso de KEKSO. La Bierknabo. Lingvaj Perspektivoj – TEJO ĉe la Eŭropa Junulara Okazaĵo. Die DEJ beim Kirchentag in Nürnberg. Venonta tutmonda klimatsatriko.

30-32: Aranĝoj: Die 39. Internationale Frühlingswoche fand erneut statt.

39-a Printempa Semajno Internacia okazis denove reale.

Esperanto-Informationsstand beim Herzberger Zamenhof-Denkmal


Vor einigen Monaten hatte die bundesweite Organisation DEIN e.V. (DEmokratie & INformation) aus München in einer Informationsaktion gegen Hass usw. u.a. für die neutrale Weltsprache Esperanto als Brückensprache für die Völkerverständigung geworben.

Es wurde sogar auch das Herzberger Zamenhof-Denkmal abgebildet. Der Verein DEIN e.V. rief u.a. Vereine und Privatpersonen dazu auf, am 10. Juli Aktionen u.a. gegen Fremdenfeindlichkeit zu organisieren.

Der Grund war und ist, dass am 10. Juli 1945 erstmals nach dem Weltkrieg II. in Dresden „Nathan der Weise“ des Aufklärers Gotthold Ephraim Lessing aus Wolfenbüttel aufgeführt wurde.

Das Stück befasst sich mit der Thematik, welche der großen Weltreligionen die Beste sei. Dabei werden die Schwerpunkte Menschlichkeit, Moral und Toleranz in den Vordergrund gestellt.

An diesem erinnerungswürdigen Tag will man auch in den nächsten Jahren vermehrt öffentliche Aktionen starten.



Das Herzberger Esperanto-Centro hatte an diesem Tag auf dem Zamenhof-Platz einen Informationsstand aufgebaut.

Neben allgemeinen Informationen über den Sinn und Zweck dieser Brückensprache wurde auch über den Erfinder Dr. L.L. Zamenhof berichtet. Natürlich gibt es auch ein historisches Büchlein in einer Esperanto-Übersetzung von Nathan der Weise, "Natan la Saĝulo".

Jarĉefkunveno por la jaro 2022 de la Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg

Dum pli ol kvindek jaroj la regiona Esperanto-Societo Sudharco (EGS) kun sidejo en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo senpaŭze multflanke aktivadas.

Krome (certe vi jam scias) ni gastigas ĉi-tie ankaŭ la Asocion de germanaj Esperanto-instruistoj (AGEI) kaj la GEA-Filion por Klerigado kaj Kulturo.

En julio 2023 la oficiala kontrakto inter la urboadminstracio kaj la Esperanto-Centro Herzberg (EGS) festas jam la 17-jaran "naskiĝdatrevenon"!

La jarĉefkunveno (por la jaro 2022) de la Fondaĵo Esperanto-Urbo Herzberg (Stiftung Esperanto-Stadt Herzberg) okazis la 11-an de junio 2023. La plej multaj membroj de la organoj (estraro kaj kuratoraro) de la Fondaĵo aperis okaze de la komuna jarĉefkunveno.

La belan grupfoton en la interna korto de la urbodomo Herzberg faris fama membro de la estraro, nome samideano Brian Moon el Luksemburgio. En la mezo de la dua vico vi vidas nian dinamikan ĉefon de la Esperanto-urbo Herzberg, nome urbestron Christopher Wagner.



Limburga Tago unuigas tri landojn

Belgoj, nederlandanoj kaj nordrejn-vestfaloj komune sub la tero.

La 21-an de Majo 2023 okazis Limburga Tago en Genk. La urbo en la flandra regiono Limburgo trapasis grandan ŝanĝon en la pasinta jarcento.

Ekde 1914 oni ekspluatias karbon en la du minejoj Waterschei kaj Zwartberg. Ene de nur dekkvin jaroj la enloĝantaro kreskis de 2.500 al 25.000 homoj. Estis laboristoj el Pollando kaj Ukrainujo, poste Italujo, Hispanujo, Greklando kaj Portugalujo. En la 1960-aj jaroj ankaŭ venis laboristoj el Turkujo kaj Maroko.

Fine de la 1980-aj jaroj la struktura ŝanĝo komencis kaj la du minejoj fermiĝis.

Hodiaŭ estas ĉefe metalaj firmaoj, kiuj donas laborlokojn en Genk, ekzemple en la aŭtomobila industrio. Unu minejo transformiĝis al muzeo, kiu montras la historion de la mineja laboro. Tiun lokon, nomatan C-mine, la partoprenantoj de la Limburga Tago vizitis.

La tago komenciĝis per promenado tra la historia parto de la urbo Genk. La tipa flandra konstrumaniero allogis la vizitantojn.

Poste la organizantoj ofertis piknikon subĉielan en apuda parko. Posttagmeze la partoprenantoj vizitis la muzeon, kiu situas en la iama minejo.

La tago finiĝis per komuna biergustumado de loka belga biero.

Andreas Diemel



100 jaroj de Sarlanda Esperanto-Ligo

En oktobro de la jaro 1923 kunvenis esperantistoj el la tuta tiel nomata „Saar-teritorio“ por fondi la unuan tutlandan Esperanto Ligon, la „Esperanto-Ligon de la Saar-teritorio“.

Dum la nazia reĝimo, ĉiuj Esperanto-asocioj estis ŝtate malpermesataj kaj post la Dua Mondmilito daŭris ankoraŭ kelkajn jarojn ĝis kiam la esperantista vivo restariĝis.

En la jaro 1951 refondiĝis la sarlanda organizo kiel “Sarlanda Esperanto-Asocio” kaj ŝanĝis sian nomon ankoraŭfoje en la jaro 1959 al „Sarlanda Esperanto-Ligo”.

Pro la kronvira pandemio ne okazis asocia laboro dum ĉirkaŭ tri jaroj kaj oni preskaŭ pretervidis la alvenantan jubileon. Pro tio la decido festi la ligan fondiĝon estis spontane kaj entuziasme farita.

Sarlanda Esperanto-Ligo festos sian 100-jariĝon per Jubilea Kultura Semajnfino de la 13a ĝis la 15a de oktobro 2023 en la Kardinal-Wendel-Domo en Homburgo. (<https://www.kardinal-wendel-haus.de/>) Atendas vin interesa programo konsistanta



el diversaj prelegoj por Esperanto-parolantoj, kursoj por progresintoj kaj komencantoj. En la libroservo vi certe trovos allogajn legajojn kaj esperantajojn.

Ni komencos la semajnfinojn jam vendrede posttagmeze per la alvojaĝo de la partoprenantoj kaj post la vespermanĝo ni kunsidos en etosa rondo por (pli bone) interkonatiĝi. La tutan sabaton kaj la dimanĉon ni dediĉos al prelegoj, lingvokursoj kaj ekskursoj en la urbon aŭ en la ĉirkaŭaĵon.

La kulmino de la Jubilea Kultura Semajnfino estos la festvespero sabate. Jam antaŭĝoju pri bela, bongusta festbufedo en solena etoso!

La aliĝilon vi trovas en nia retejo <https://www.esperanto-sarlando.info/arangoj/> **Martin Thorenz**

BAVELO invitas al sia Aktiva Seminario en Rottweil, 1-a – 3-a de Septembro 2023

Rottweil estas la plej antikva urbo de Baden-Virtembergo, sed ĝi ankaŭ havas unu el la plej novaj allogaĵoj: 246 m altan turon kun la plej alta panorama platformo de Germanio.

Firmao Thyssenkrupp starigis ĝin por testi liftojn. De oktobro 2017 povas veni vizitantoj. – Jam la ekstera aspekto estas interesa: Ĝi estas kovrita per teksaĵo, kiu donas tute diversajn impresojn depende de la taga lumo.

Ene de la turo okazas eksperimentoj pri liftoj: Kelkaj liftoj povas plurope okupi la saman ŝakton – kiel tio povas esti ??? Tion vi ekscios surloke, ĉar en la dimanĉa mateno ni esploros tion dum komuna ekskurso. Sed ne nur la liftoj estas interesaj, eĉ la konstruado de la turo mem montras plurajn rekordojn (vi povas spekti 7-minutan videon pri tio ĉe youtu.be/V1hbyrxdNhE).

Dum la sabata posttagmezo okazos la tradicia ekskurso: ni iros al la urbo, kiun la romianoj fondis en la jaro 73 p.K. Sed ĉi tiu ekskurso estas aparta: ĉar ni sukcesis dungi de la urbo oficialan ĉiĉeronon, kiu rekte esperantlingve gvidos nin tra la historia urbokerno. Ambaŭ ekskursojn gvidos la profesia ĉiĉeron pri la urbo kaj la turo, nome Christoph Frank, Rottweil-ano kaj de 2021 ankaŭ estrarano de BAVELO. Do vi jam povas antaŭĝoĵi kompetentan gvidadon al intereseĝaj vidindaĵoj.

Pri la aktiveco dum la seminario: Vi povas partopreni per via propra temo: dum kvaronhoru vi povas prezenti ion, kio gravas por vi.

Legu pli pri tiu intereseĝa BAVELO-Seminario kaj aliĝu ĉe esperanto-bw.de/seminario-eo

BAVELO lädt ein zum Aktiva Seminario in Rottweil, 1.-3. September 2023

Rottweil ist die älteste Stadt Baden-Württembergs, hat aber eine der neuesten Attraktionen: einen 246 m hohen Turm mit der höchsten Aussichtsplattform Deutschlands.

Es wurde von der Firma Thyssenkrupp gebaut, um Aufzüge zu testen. Seit Oktober 2017 ist er auch für Besucher zugänglich.

Schon die äußere Erscheinung ist interessant: Der Turm ist mit einem Stoff bespannt, der je nach Tageslicht ganz unterschiedliche Lichteindrücke vermittelt. Im Inneren des Turms werden Aufzüge getestet: Mehrere Aufzüge können denselben Schacht befahren. – Wie kann das denn gehen? – Das erfahren wir vor Ort, denn am Sonntagmorgen erkunden wir den Turm bei einem gemeinsamen Ausflug. Aber nicht nur die Aufzüge sind interessant, auch der Bau des Turms selbst weist mehrere Rekorde auf. (Sie können sich dazu ein zeitbeschleunigtes 7-minütiges Video ansehen auf youtu.be/V1hbyrxdNhE).

Am Samstagnachmittag findet der traditionelle Ausflug statt: Wir fahren in die Stadt, die im Jahr 73 n. Chr. von den Römern gegründet wurde. Aber dieser Ausflug ist etwas Besonderes: weil wir es geschafft haben, einen offiziellen Stadtführer zu engagieren, der uns direkt auf Esperanto durch die historische Innenstadt führt. - Beide Touren werden vom professionellen Stadt- und Turmführer Christoph Frank geleitet. So können Sie sich schon jetzt auf eine kompetente Führung zu interessanten Sehenswürdigkeiten freuen.

Bei so vielen Höhepunkten sollen auch die Kurse Höhepunkte haben, weshalb wir wieder die Form eines Aktiven Seminars anbieten: Im Mittelpunkt der Aktivitäten sollen Ihre Interessen und Talente und Ihre Eigeninitiative stehen. Vielleicht beschäftigen Sie sich intensiv mit einem Thema, sei es historisch, biologisch, astrophysikalisch, beruflich, medizinisch oder... - das ist die lang ersehnte Gelegenheit, darüber zu sprechen. Vielleicht spielen Sie gerne Musik oder singen oder treten auf ... Was auch immer - Sie können das gerne mit uns teilen.

Die "Kurse" finden also, bis auf die grundlegendsten Anfänger, nicht in der klassischen Form mit nur einem Lehrer und den anderen allen Schülern statt, sondern in Form von Präsentationen unter Freunden.

Mehr Infos und Anmeldung zu diesem BAVELO-Seminar unter esperanto-bw.de/seminario-de

Afrika agado

Partoprenante la 8-an Afrikan Kongreson de Esperanto (AKE) en Senegal, mi ekkonis plurajn aktivulojn kaj komprenis, kiom valora estas ilia laboro por la Internacia Lingvo. Tial mi volas prezenti kelkajn el ili kun iliaj projektoj.

La dua estas ESPOIR NGOMA KASATI el la Demokratia Respubliko Kongolando. Li volas starigi Esperanto-bibliotekon en Lubumbashi, kie li loĝas. Lia retadreso estas: espoirkasati@gmail.com.

Evidente lia agado en Esperantujo estas tre valora. Legu liajn proprajn vortojn: „Mia klubo troviĝas en la suda parto de la Demokratia Respubliko Kongo, en ĝia dua plej granda urbo. Konsiderante la malfacilaĵojn por ekspedi Esperanto-librojn de Eŭropo al Afriko, kaj la maleblojn surloke produkti Esperanto-librojn, jen la kialo, pro kiu ni decidis realigi tiun ĉi projekton, por trovi solvon al oftecaj problemoj, kiujn konstante alfrontas niaj ĉeestaj kluboj.

Kompreneble ne temas pri la tiel nomata esperantista eldono en Lubumbaŝo, sed iu speco de libro-produktejo nur por lokaj esperantistoj, por faciligi la lernadon de la lingvo Esperanto kaj por plibonigi la lern- kaj instru-manierojn en nia klubo. Pro tio ni celas per tiu ĉi projekto varbi financon subtenon, por aĉeti materialojn, kiuj povas ebligi la plenumadon de nia celo.

Ni planas por ĉiu ĉeesta klaso elprinti kursojn por lernantoj, elprinti librojn, haveblajn en pdf-formato, por disponigi ilin al la loka esperantistaro, por bona tradicia ĉeesta lernado, kio estu bona lernado por la lego-rondoj.

La materialoj bezonataj jenas: klasĉambro, du tabloj, 25 seĝoj, printilo, kvin boteloj da inko, komputilo, ŝranko, 10 paketoj da paperoj.

Pri la klasĉambro ni jam kunlaboras kun loka pastro, kiu helpas al nia klubo, donante al ni lokon ene de sia preĝejo, por daŭrigi la instruadon de Esperanto senkoste, aldone pri komputilo, la instruisto mem, studento pri informatiko havas propran komputilon, kiu povas plene servi por plenumi tiujn taskojn, tamen restas la ceteraj materialoj aĉetendaj, kiuj povas multe helpi en la produktado de tiuj lerniloj surloke.“

Mi taksas tion bona ideo kaj volas instigi vin al financa subteno de lia projekto. La tuta monsumo, kiu estas bezonata, estas 1250 €, sed eĉ malgrandaj sumoj jam helpas. Konsideru, ke en la jaro 2024 okazos la Universala Kongreso de Esperanto en Afriko, kio laŭ miaj spertoj ankaŭ tre multe antaŭenpuŝos nian movadon.

Se vi volas subteni tion, bonvolu sendi vian donacon al la Konto Afriko de UEA. Se vi volas subteni la projekton de la samideano Espoir Ngoma Kasati, kontaktu lin rekte per lia retadreso espoirkasati@gmail.com. Pro juraj malfacilaĵoj, GEA aŭ la fondadoj ne povas administri tion. Koran dankon.

Andreas Emmerich

Renkontiĝo en Kolonjo

Komence de Julio la kolonja grupo renkontiĝis ĉe hejmeca kradrostado ĉe nia ŝatata estro Harald Schmitz kaj lia ĉarma edzino Nora en Pulheim.

Bedaŭrinde kelkaj klubanoj forestis pro ferioj aŭ aliaj kaŭzoj. Dum la gustumado de diversaj frandaĵoj okazis vigla babilado pri "Dio kaj la mondo".

Bedaŭrinde iam ankaŭ finiĝis la plej belega vespero. Post refreŝiga deserto, kiu konsistis el vanila glaciaĵo kaj freŝaj fragoj, ĉiuj gaje reiris hejmen.

Foto: Oskar Hassel



Kalendaro

Oktobero 2023

15-20: 11-a Esperantista Migrado Aŭtuna en Bad Kissingen/Rhön, Germanio.
Informoj ĉe <https://www.esperanto.de/de/ema>



Decembro 2023/Januaro 2024

27- 02 Januaro: Luminesk' sur la insulo Norderney, Germanio.
Informoj ĉe <https://www.esperanto.de/de/luminesk>



27-03 Januaro: Junulara Esperanto-Semajno en Storkow, Germanio. Informoj ĉe <http://jes.pej.pl/eo/>



**deutsche
esperanto
Jugend**



**pola esperanto-junularo
polska młodzież esperancka**

Kunvenoj de CoNGO (Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj)

Vieno, Aŭstrio, 27-28 Aprilo 2023.

La estraro de CoNGO renkontiĝis por sia kutima aprila kunsido en Vieno la 27-an de Aprilo. UEA-n reprezentis Humphrey Tonkin, kiu prizorgas la rilatojn kun UN kaj CoNGO en Novjorko. Temis pri hibrida aranĝo, kvankam la reprezentanto de UEA (troviĝante en Vieno tiutempe) ĉeestis persone. Inter la aliaj personaj ĉeestantoj estis kompreneble prezidanto Liberato Bautista kaj la vicprezidantoj Cyril Ritchie kaj Martina Gredler.

La estraro ricevis raportojn de la prezidanto kaj vicprezidantoj, financon raporton, raportojn de la estraraj komitatoj (pri financo, membraro, komitatoj, specialaj aranĝoj) kaj raportojn de la diversaj konstantaj komitatoj de CoNGO, interalie de la Komitato pri Lingvoj, kiun prezidas Francis Hult (UEA) kaj vicprezidas Humphrey Tonkin (UEA). La raporto de la lingva komitato ekzistas ankaŭ en Esperanto-traduko.

La financa raporto (UEA estas ano de tiu ĉi komitato) indikis ekvilibron de spezoj, sed enspezoj kaj elspezoj estas konsiderinde malpli altaj ol la buĝeto antaŭvidas. Unu el la kaŭzoj de tiu ne tute kontentiga situacio estas nesufiĉa ritmo de varbado kaj revarbado de membrokategorioj de la diversaj aliĝintaj neregistaraj organizoj (NROj). Eble temas ankaŭ pri tio, ke NROj ne rimarkas la avantaĝojn de membreco – temo kiu bezonas seriozan pritrakton kaj evoluigon de konkretaj helpiloj. Plia granda kaŭzo de la mankoj estas manko de administra subteno. Estas pli facile kolekti monon por specialaj aranĝoj ol tion fari por rutinaj laboroj.

La sistemo de t.n. substancaj komitatoj konsistas el komitatoj de NROj bazitaj en Novjorko, Ĝenevo kaj Vieno, plus kelkaj tutmondaj komitatoj. Kelkaj estas tre aktivaj (ekz. homaj rajtoj, pli aĝaj personoj, paco, narkotajoj, lingvoj); kelkaj bezonas stimulon. La pandemio interrompis ĉeestajn kunvenojn, kaj pluraj komitatoj transiris al virtualaj aranĝoj. La plioftiĝo de virtualaj aranĝoj malfortigis la ligojn al apartaj UN-urboj: estontece sendube komitatoj fariĝos malpli forte ligitaj al difinitaj urboj aŭ regionoj.

Ĉefa temo de la kunsido estis planoj por festado de la 75-a jubileo de CoNGO. Temas pri kvar specialaj renkontiĝoj en Vieno (Aprilo), Bangkoko (Majo), Novjorko (Oktobro) kaj Ĝenevo (Decembro) kaj ses Tutmondaj Temaj Vebinarioj (prefere: retaj seminarioj) pri:

- socia justeco (ĉefe migrado, raso, sano) [Marto: jam okazis]
- tutmonda justeco (la Celoj por Daŭripova Evoluigo, humanitara agado) [Majo]
- genra justeco (plus junulara kaj intergeneracia justeco) [Junio]
- paco kaj minacoj kontraŭ la sekureco de homoj kaj la planedo) [Aŭgusto]
- rilatoj inter UN kaj NROj (multflankismo, civila spaco kaj demokratia interrilato) [Oktobro]
- homa digno kaj homaj rajtoj [Decembro]

Dum la posttagmezo de 28 Aprilo okazis festa sesio de CoNGO en la viena internacia centro, la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj. Ĉeestis ĝin nome de UEA Humphrey Tonkin, Jane Edwards, Alfred Heiligenbrunner (reprezentanto de UEA ĉe UN-Vieno), Bernhard Tuider (Esperanto-Muzeo Vieno) kaj François Lo Jacomo (reprezentanto de UEA ĉe Unesco-Parizo kaj estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj).

Prezidis la aranĝon en la UN-sidejo la prezidanto de CoNGO Liberato Bautista.

Salutis la kunvenon Ghada Fathi Waly, Ĝenerala Direktoro de UN-Vieno; Peter Launsky-Tieffenthal, Ĝenerala Sekretario de la Eksterlanda Ministerio de Aŭstrio – kaj reprezentantoj de la vienaj UN-misioj de pluraj landoj. Bonvenigis la ĉeestantojn reprezentanto de la urbestro de Vieno. Ĉefparolantoj, aldone al CoNGO-prezidanto Bautista, estis Nikhil Seth (Ĝenerala Direktoro de UNITAR, la Instituto de UN pri trejnado kaj esploroj), Helga Konrad (aŭstria politikisto kaj laboranto kontraŭ homa trafikado) kaj Manfred Nowak (Sendependa Fakulo, estro de la Tutmonda Studo de UN pri Infanoj Senigitaj de Libereco).

Konstatoj flanke de la UEA-reprezentanto:

1. La financa komitato, en kiu UEA membras, apenaŭ kunsidis dum la jaro kaj ne ricevis bonajn financajn raportojn. Nepre necesas rekonsistigi la komitaton kaj doni al ĝi pli aktivan rolon. Necesas ankaŭ trovi manieron instigi la unuopajn membrajn organizojn de CoNGO ne nur ĝui per ĝi avantaĝojn, sed ankaŭ preti aktive kontribui al varbado de organizoj, homoj kaj resursoj.

2. Pozitiva fakto estas tio, ke la nova Komitato pri Lingvoj, sub prezido de reprezentanto de UEA (ankaŭ membras en ties estraro reprezentanto de TEJO), estas inter la plej aktivaj komitatoj – sed iasence tio estas samtempe negativa faktoro: kelkaj aliaj komitatoj iom lamas, eble pro la pandemio. Indus, ke reprezentantoj de UEA ludu pli aktivajn rolojn en kelkaj tiuj komitatoj (notindas, ke Alfred Heiligenbrunner, UEA-reprezentanto, estas vicksekretario de la viena komitato pri paco). Listo de la komitatoj troviĝas ĉi tie: <http://ngocongo.org/ngo-committees-2>

3. Se UN volas kontakti NROjn ĝenerale, ĝi emas turni sin tute nature al CoNGO. CoNGO ĝuas influon super la politikoj kaj praktikoj de UN koncerne rilatojn kun NROj.

Sekve la pozitiva rolo kiun UEA ludas en CoNGO estas signifa avantaĝo por ni.

4. Ricevis apartajn laŭdojn de pluraj ĉeestantoj la okazaj mesaĝoj kiujn UEA sendas al UN okaze de specialaj "tagoj" de UN.

5. La fakto, ke la oficejo de UEA en Novjorko troviĝas en sama konstruaĵo kiel la oficejo de CoNGO, faciligas la neformalajn rilatojn, kaj kunlaboron ĝenerale.

Humphrey Tonkin

10 Majo 2023

Tri generacioj de esperantistoj kunestas diskutante kaj manĝante

Vieno, Aŭstrio, 7 Julio 2023.

La 7-an de Julio nunjare renkontiĝis en la gastejo Brandauer apud la kastela arealo de Schönbrunn en Vieno reprezentanto de la plej juna generacio sur tiu foto, Felix Baur, 20-jara aŭstro, nun studento de politikscienco en La Hago, Nederlando, vidalvide de li Hans Michael Maitzen, 80-jara emerita profesoro de la Universitato de Vieno, ankaŭ aŭstro, evidente la plej maljuna, kaj la foton faris lia filino Stella Maitzen, bakalaŭrino de la Universitato de Vieno kaj redaktorino de la *Kronenzeitung*, la plej granda tagjurnalo aŭstra.

Ĝus fariĝinte 41-jara, Stella reprezentas la mezan generacion en tiu kunveno. Temo de la kunveno estis evidente kunmanĝado, sed pro la esperantisteco de ĉiuj tri ankaŭ la diskutado de aktualaj movadaj okazaĵoj kaj fenomenoj, ekz. la Esperanto-Tago baldaŭa kaj la ĉi-jara UK en Torino, same baldaŭa.

2023-07-14 **Hans Michael Maitzen**



Renkontiĝo en Vieno

Vieno estas gastama urbo.

Ankaŭ esperantistoj ŝatas ĝin.

Vendrede, la 14-an de Julio 2023, kelkaj sendepende vojaĝantaj esperantistoj kolektiĝis tie. Tagmeze alvenis ĉe la Ĉefa Stacidomo Vieno la fama junulo John Magessa. Li origine devenas de Tanzanio. Venontjare la Universala Kongreso okazos en Tanzanio. John ĉarme varbas pri tiu evento. Tiucele li vizitis plurajn eventojn en eŭropaj landoj, inkludante la UK-on en Torino kaj postkongresajn aranĝojn. Feliĉe, UEA iom subtenas tion.

La saman tagon ankaŭ troviĝis en Vieno Bertrand kaj Veronique Verstraete. Ili estas esperantistoj, kiuj ŝatas bicikladi. Ili startis en Budapeŝto kaj biciklis ĝis Vieno. Ili planas daŭrigi la veturon en la direkto al Parizo.

Ni ĉiuj kolektiĝis posttagmeze antaŭ la Esperantomuzeo Vieno.

Walter Klag sperte montris al ni dum plurhora promenado la plej interesajn vidindaĵojn de Vieno.

Krome ĉeestis Marina Coppedge. Ŝi vivas en Vieno. Nur antaŭ kelkaj semajnoj ŝi decidis lerni Esperanton. Kaj ŝi jam bone povis sekvi la konversacion.

Ĉu necesas daŭre aktiviĝi por teni kontakton al esperantistoj? Ne zorgu!

Ĉar: kiam vi ne venas al Esperantujo, Esperantujo venos al vi.

La bildo montras laŭvice de maldekstre: Walter Klag, Alfred Heiligenbrunner, Bertrand kaj Veronique Verstraete, Marina Coppedge, John Magessa.

2023-07-14 **Alfred Heiligenbrunner**



Intervjuo kun Amri Wandel

(Konkluda parto, daŭrigo el *Esperanto*
aktuell n-ro 279, paĝo 7.)

Multaj fizikistoj estas malkontentaj pri la nuntempaj fizikaj teorioj, ne nur pro misteroj kiel malhela materio kaj malhela energio. Ili pensas, ke la valoroj de fizikaj konstantoj, kiel gravitec-konstanto, rapideco de lumo, elektra forto kaj aliaj, devus deveni el pli saĝaj teorioj kiel devigaj valoroj. Ĉu vi pensas ke pli profunda teorio estas trovebla?

Tio estas eĉ pli profunda demando ol ĉiuj antaŭaj kaj multaj provis atingi tian finan teorion, kiu en la unua paŝo kunigas la du grandajn teoriojn de la moderna fiziko. Tio estas la kvantuma teorio kaj la Ĝenerala Relativeco de Einstein kaj ĝis nun oni ne sukcesis tion fari. Estas interna problemo, ke ni ne sukcesis kunordigi tiujn du teoriojn, kvankam ni scias, ke la naturo ja obeas ambaŭ, sed en diversaj distancoj, grandecoj, fortoj.

La aferoj kiujn vi menciis, ekzemple malhela energio aŭ malhela maso, ili estas observataj kaj estas aferoj kiuj estis necesaj, ĉar ni havis certajn observojn pri la universo, kaj por klarigi tiujn observojn ni devus enkonduki tiun aferojn, tiujn du aferojn, kiujn ni ne scias kio ili estas. Sed ni scias, ke ili aperas en la ekvacioj matematike, sed ankoraŭ oni ne trovis solvon, nek por klarigi la naturon de la malhela energio kaj malhela materio, nek por kunfandigi tiujn du bazajn teoriojn de la fiziko. Albert Einstein mem provis dum multaj jaroj tion fari kaj ne sukcesis. Post li venis ankoraŭ generacioj da brilaj junaj teoriistoj kaj ankoraŭ ne sukcesis.

Reen al la problemoj sur nia terglobo: Multaj homoj pensas ke vojaĝoj influas la klimatsanĝon. Kiajn decidojn faru esperantistoj en tio?

Nu, estas diversaj opinioj pri tio, sed oni ne certas. Se vi demandus min, ne estas pruvo ke la globa varmiĝo estas kaŭzita nur de la homo, eble oni diras, ke parte ĝi povus esti el naturaj cikloj. Mi eble ŝatus respondi, simile al tio, kion mi jam faris en la unua demando pri la estonteco de la homaro. La terglobo ekzistas kvar kaj duono miliardojn da jaroj. Laŭ niaj geologiaj esploroj, kiuj iras ĝis eble kelkcentoj da milionoj da jaroj, estis periodoj pli varmaj kaj malpli varmaj, periodoj kun multe pli da karbondioksido, ol ni havas nun, kaj la tero havis multajn glaciepokojn kaj ĉion travivis, kaj iel la natura balanco revenis.

Oni demandu, ĉu la homaro kapablos en kelkdek jaroj ŝanĝi tiun balancon en tiu terura formo, ke la tero, kiu mem sukcesis travivi koliziojn kun asteroidoj kaj vulkanaj erupcioj, kiuj elverŝis en la aeron amason da karbondioksido. La tero mem sukcesis rebalanciĝi. Ĉu ni povas tion kaŭzi mem? Mi ne scias. Tio ne diru, ke oni ne ŝparu per emisioj, kompreneble, sed laŭ multaj sciencistoj

ne estas pruvo, ke la klimatsanĝoj venas nur de la homo kaj ĉu la homo povas batali tion mem. Se ni ekzemple sukcesas redukti niajn karbondioksidadajn emisiojn, tio certe ne povas malhelpi, sed ĉu tio helpos? Eble tio ne estas la sola kialo, do vojaĝo estas et-et-eta parto de la karbondioksida emisio, dum industrio kaj aŭtoj kaj aliaj kontribuas multe pli.

Kio estas science pruvita, estas, ke ekde cent kvindek jaroj pli-malpli la nivelo de karbondioksido en la atmosfero regule kreskas pro la homa influo. Sed ĉu tio tute rilatas al la varmiĝo kaj al la klimataj katastrofoj, oni ne povas pruvi.

Do mia persona opinio (mi ankaŭ aperigis plurajn raportojn en "Esperanto" pri la klimatsanĝaj kulminaj kunvenoj, estis ankaŭ pasintjare kaj ĉi-jare kaj ĉiam la konkludo) estas: jes, ni faru kion ni povas, tio certe ne povas malhelpi, sed ni ne faru tro. Ekzemple se oni decidus ne veturi al kongreso, ĉar oni ŝparos tiom kaj tiom da kilogramoj da karbono, laŭ mi tio ne estas racia decido.

Kiuj estas viaj plej gravaj ekzemplodonaj homoj, idoloj?

Jes, nu, Albert Einstein estas unu el miaj idoloj, mi povas diri, ĉar li en unu jaro verkis kvar artikolojn, kiuj ŝanĝis la historion de la moderna scienco. Tio estas kiam en unu el ili li inventis la relativecon. Ankaŭ la tri aliaj, ĉiu el ili tre grava. Kaj li havis la vizon kaj ankaŭ mem verkis la Ĝeneralan Relativecon, kiu poste estis pruvita kaj tio estas, kiel mi antaŭe diris, unu el la bazaj teorioj, kiuj plej bone priskribas la naturon. Ni ankoraŭ ne trovis alternativon al Ĝenerala Relativeco, kiu pli taŭgas al multegaj naturaj fenomenoj, kiujn ni konas.

Kaj la lasta demando estas: Kio estas via plej grava moto?

*Ah, tio estas facila. Nia vivo estas mallonga.
Uzu ĝin saĝe!*

Estas bona respondo. Plaĉas al mi. Dankon, sinjoro!

La intervjuon faris kadre de Esperanto-Retradio
Franziska Dodik



Germana Esperanto-Asocio / Deutscher Esperanto-Bund

D.E.B.-Haushaltsplan 2024

Einnahmen		
2109, 2110, 2111, 2112, 2113	Mitgliedsbeiträge	43.000 €
2420	Förderbeiträge	0 €
8004	Wareneinnahmen	0 €
3220	Spenden, allgemeine	0 €
2305	Zuschüsse von Behörden, Erasmus+	0 €
Summe		43.000 €

Ausgaben		
Geschäftsverkehr		
3248	Spenden, Internet	0 €
2700	Mitgliederverwaltung	-600 €
	Finanzbuchhaltung	-95 €
	Internet, Domains, Zertifikate	-700 €
2559	Personalkosten	-7.280 €
2543	soziale Aufwendungen	0 €
2555	VBG Unfallversicherung	-60 €
2570, 2572	Reisekosten, allgemein und Katzbachstraße	-300 €
4712	Nebenkosten des Geldverkehrs	-50 €
2702	Telefon, Internet-Anschluss, Zoom	-1.300 €
	AS-Infodienste (800er-Nr, Telefonkonferenz)	-800 €
2753	Versicherungen, Beiträge (Abgaben, Registergericht)	-800 €
2701	Büromaterial (Briefmarken, Druckertoner, ...)	-500 €
2752	Europa Esperanto-Unio	-800 €
	Aligitaj Membroj de UEA	-800 €
	DJH, Sonnenberg-Kreis e. V.	-85 €
2800	Mitgliederpflege	-100 €
2894	Rechts- und Beratungskosten	-400 €
2895	Kosten Erbschaften	-130 €
2810	Repräsentationskosten (Ehrungen, Todesanzeigen)	-250 €
2900	Sonstige Ausgaben	0 €
Summe		-14.250 €

Vorstandsarbeit		
3248	Spenden für Vorstandsarbeit	2.600 €
	Budget	0 €
2571	Reisekosten/Spesen/Unterbringung	-3.000 €
Summe		-400 €

Geschäftsstelle Katzbachstraße		
3233	Spenden, Katzbachstraße	0 €
2661	Raumnutzung durch ELB	960 €
2661	Miete Katzbachstraße	-7.400 €
2665	Energiekosten (Strom)	-1.500 €
2663	Versicherungen, Katzbachstraße	-500 €
2664	Einrichtung, Renovierung, Unterhalt	-400 €
2502	Computer, Maschinen, Programme	-200 €
2670	Ausgaben, Katzbachstraße, allgemein	-150 €
Summe		-9.190 €

Esperanto aktuell		
3235	Spenden, Esperanto aktuell	0 €
8006, 8007	Abonnement, allgemein	150 €
6543	Abonnement, Österreich	600 €
6901	Redaktion	-2.400 €
6902	Druckkosten	-5.000 €
6903	Versandkosten, Post	-4.500 €
6904	Verpackung und Versand durch CVS	-1.500 €
Summe		-12.650 €

Esperanto Unterricht		
3241	Spenden, Esperanto-Unterricht	0 €
6701	Personalkosten, Netto	-7.100 €
6751	soziale Aufwendungen	-1.700 €
2924	Förderung, Kurse, Seminare	0 €
Summe		-8.800 €

Auswirkung, Pressebeauftragter		
3240	Spenden, Werbematerial	0 €
2552	Personalkosten, Netto	-2.400 €
2820	Werbungskosten (z. B. Messe Werbematerial)	-1.500 €
Summe		-3.900 €

Mitgliederwerbung		
2805	Mitgliederwerbung	-1.500 €
Summe		-1.500 €

Esperanto Europa-Arbeit		
3234	Spende, Europa-Arbeit	36.240 €
2558	Personalkosten, Netto	-20.500 €
2544	soziale Aufwendungen	-12.700 €
6762, 6763	Lohnsteuer	-2.600 €
Summe		440 €

Förderungen		
3249	Spende, Landesarbeit	0 €
2920	Landesverbände, Förderung	-3.000 €
2921, 2931	Ortsgruppen, Förderung	-1.500 €
2923	sonstige Veranstaltungen	-500 €
2925	Förderung, Erasmus+	0 €

2821	Rundreisen der Referenten	-500 €	
Summe			-5.500 €

Archivarbeit			
3244	Spenden, Archivarbeit	0 €	
2913	Deutsches Esperanto-Archiv	0 €	
Summe			0 €

Esperanto-Bibliotheken			
3242	Spenden, Esperanto-Bibliothek Aalen	0 €	
2910	Subvention, Esperanto-Bibliothek Aalen	-2.000 €	
2909	Ausgaben Bibliothekssystem	-150 €	
Summe			-2.150 €

Esperanto-Zentrum "Marie Hankel"			
3243	Spenden, EZMH	0 €	
2911	Ausgaben, Marie-Hankel-Zentrum, allgemein	0 €	
2912	Ausgaben, Marie-Hankel-Zentrum, Miete	-444 €	
Summe			-444 €

Deutscher Esperanto Kongress			
Summe			0 €

PSI - Internationale Frühlingswoche			
Summe			0 €

Luminesk			
Summe			0 €

Deutsches Esperanto-Institut			
Summe			0 €

Sonstiges			
3251	Gezahlte Spenden/Zuwendungen	0 €	
4700	Zinsen Vermögensverwaltung	0 €	
Summe			0 €

Vereinsergebnis/Liquiditätsverlust			-15.344 €
---	--	--	------------------

Finanzamt für Körperschaften I 14057 Berlin Brodtschneiderstr. 5 06.07.2023
 Steuernummer: 27/663/59791
 (Bitte bei Rückfragen und Zahlungen angeben) Telefon (030) 90 24-27415
 Telefax

FA K6 1, Brodtschneiderstr. 5, 14057 Bln. 06001154 05.07.23
Freistellungsbescheid
 für 2020 bis 2022 zur
 Körperschaftsteuer
 und Gewerbesteuer

Für
 Deutscher Esperanto-Bund e.V. "D.E.B."
 Katzbachstr. 25 • 10965 Berlin

Feststellung
 Umfang der Steuerbefreiung
 Die Körperschaft ist nach § 5 Abs. 1 Nr. 3 EStG von der Körperschaftsteuer befreit.
 Sie ist nach § 3 Nr. 6 GewStG von der Gewerbesteuer befreit.

Hinweise zu steuerbegünstigten Zwecken
 Die Körperschaft fördert im Sinne der §§ 51 ff. AO ausschließlich und unmittelbar folgende gemeinnützige Zwecke:
 - Förderung von Wissenschaft und Forschung (§ 52 Abs. 2 Satz 1 Nr. 1 AO)
 - Förderung internationaler bewährter Toleranz auf allen Gebieten der Kultur und des Volkerverständigungswesens (§ 52 Abs. 2 Satz 1 Nr. 13 AO)

Hinweise zur Ausstellung von Zuwendungsbestätigungen
 Die Körperschaft ist berechtigt, für Spenden, die für zur Verwendung für diese Zwecke zugewendet werden, Zuwendungsbestätigungen nach amtlich vorgeschriebenem Vordruck (§ 50 Abs. 1 EStG) auszustellen. Die amtlichen Muster für die Ausstellung steuerlicher Zuwendungsbestätigungen stehen im Internet unter <https://www.fomulare-bfnnv.de> als ausfüllbare Formulare zur Verfügung.

Die Körperschaft ist berechtigt, für Mitgliedsbeiträge Zuwendungsbestätigungen nach amtlich vorgeschriebenem Vordruck (§ 50 Abs. 1 EStG) auszustellen.

